



THE ESPERANTO MONTHLY

A MAGAZINE FOR TEACHERS AND STUDENTS OF THE INTERNATIONAL LANGUAGE



All the world at your elbow

WELSH NUMBER

ESPERANTO encourages the small nationalities in the maintenance of their independence by the preservation of their national language.

It makes their literatures known to the world. Used as the SECOND LANGUAGE of all peoples, it gives them access to the whole world, and gives the whole world access to them.

Published by
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC)
17. HART STREET, LONDON, W.C.1.

ESPERANTO AT A GLANCE

ESPERANTO IS PHONETIC.

All letters sounded :
one letter
one sound.

ACCENT or STRESS falls on the second last syllable.

NO IRREGULARITIES.
NO EXCEPTIONS.

THE ALPHABET OF ESPERANTO

A a	B b	C c	Ĉ ĉ	D d	E e	F f	G g
<i>ah</i>	<i>bo</i>	<i>tso</i>	<i>cho do</i>	<i>ch fo</i>	<i>so</i>		
Ĝ ĝ	H h	Ĥ ĥ	I i	J j	Ĵ ĵ		
<i>Joe</i>	<i>ho</i>	<i>hho</i>	<i>ee</i>	<i>yo</i>	<i>zho</i>		
K k	L l	M m	N n	O o	P p	R r	S s
<i>ko</i>	<i>lo</i>	<i>mo</i>	<i>no</i>	<i>oh</i>	<i>po</i>	<i>ro</i>	<i>so</i>
Ŝ ŝ	T t	U u	Ŭ ŭ	V v	Z z		
<i>sho</i>	<i>toe</i>	<i>oo</i>	<i>wœ</i>	<i>vo</i>	<i>zo</i>		

No Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U have approximately the sounds as in *bar, bear, bier, bore, boor.*

C is not sounded like S or K, but like *ts* in *Tsar.*

J has the sound of *y* in *yes.*

The sounds of ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, and ŭ are heard in *leech, liege, loch, leisure, leash, and leeway.*

THE GRAMMAR is based upon SIXTEEN FUNDAMENTAL RULES.
THE PARTS OF SPEECH are formed from Root-Words by the addition of appropriate Letters.

O is the ending of the NOUN: **A** ADJECTIVES end in

fakto	gluo	evidenta	freŝa
telefono	fajro	longa	furioza
piano	tasko	granda	simpla

NOUNS and ADJECTIVES form the PLURAL by adding

evidentaj faktoj	longaj telefonoj	grandaj pianoj	J <i>aj, oj</i> sound as in <i>my boy</i>
------------------	------------------	----------------	--

THE SIMPLE VERB HAS ONLY SIX INFLECTIONS.

INFINITIVE.	PRESENT.	PAST.	FUTURE.	CONDITIONAL.	IMPERATIVE.
I	AS	IS	OS	US	U
ESTI	estas	estis	estos	estus	estu
LERNI	lernas	lernis	lernos	lernus	lernu
INSTRUI	instruas	instruis	instruos	instruus	instruu

N marks the ACCUSATIVE (*direct object*)

Mi (<i>I</i>) instruas lin (<i>him</i>)	E ADVERBS end in
Li (<i>he</i>) instruas min (<i>me</i>)	
Ŝi lernas Esperanton	

rapide
entuziasme
diligente

ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

PARTICIPLES used as ADJECTIVES, NOUNS, and ADVERBS:

ACTIVE—Present -ANT'	Past -INT'	Future -ONT'
PASSIVE—Present -AT'	Past -IT'	Future -OT'
Mi estas instruanta.	Mi estas la instruanto.	Instruante, mi lernas.
Vi estas instruata.	Vi estas la instruato.	Instruate, vi lernas.

CU pr. <i>chew.</i> ASKS QUESTIONS.	piano	} estas INSTRU- MENTO	rozo	} estas FLORO	banano	} estas FRUKTO	elefanto	} estas BESTO.
	harpo		tulipo		tomato		gorilo	
	fluto		lilio		melono		ĝirafo	
	violono		geranio		olivo		kato	
	orgeno		violo		orango		hundo	
	trumpeto		narciso		figo		kamelo	

Let your YES be **JES** and your *NAY* be **NE**

LA tasko } estas simpla	THE PREFIX	malsimpla	KOLOROJ.
piano } (is) granda	MAL	malgranda	blanka papero
(The) fiŝo } estis freŝa		malfreŝa	ruĝa inko
anekdoto } (was) longa	DENOTES	mallonga	blua krajono
progreso } estos rapida	OPPOSITES.	malrapida	bruna ĉokolado
raporto } (will be) favora		malfavora	rozaj lipoj

NUMERALS—UNU, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; mil, 1000; miliono. ORDINALS: unua klaso, dua klaso, tria klaso.

PROFESSIONS shown by suffix	IST dentisto farmaciisto	ĵurnalisto botisto	FEMININES shown by suffix	IN patro patrino reĝo reĝino leono leonino
-----------------------------	---------------------------------	--------------------	---------------------------	---

An ESPERANTO KEY, containing Grammar, Vocabulary, and Exercises, will be sent on receipt of a penny stamp by THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorp.), 17 Hart St., London, W.C.1

Cymru a'r Esperanto.

Y mae rhesymau neilltuol paham y dylai cenedl y Cymry roddi derbynad croesawus a chalonnog i'r helpiaith gyd-genedlaethol Esperanto—rhesymau sy'n apelio'n ogymaint at naws y Celt ag at safbwynt mwy ymarferol yr ieithwr.

Yn anffodus ni wyr pobl gwledydd tramor fawr ddim am fywyd ac iaith cenedl y Cymry, ac yn wir ychydig iawn ohonynt sy'n dirnad y siaredir iaith arall heblaw y Saesneg ym Mhrydain.

Y mae gan Gymru lawer o enwogion ymhob cylch o fywyd cyhoeddus—yn llenorion, gwleidyddion, gwyddonwyr, celfyddydwyr, etc., ac onid yw ei beirdd a'i cherdorion wedi tystiolaethu'n hyawdl i fesur ac ansawdd yr ysbryd cenedlaethol? ; a'r Eisteddfod hithau wedi bod yn foddion i gadw traddodiadau a defion y Genedl yn fyw.

Er hyn i gyd, i'r byd y tu allan ni ddatguddiwyd eto wir anian ac enaid y genedl oblegid, yn anad dim, nad yw ei gweithiau llenyddol yn wybyddus mewn gwledydd ereill drwy gyfrwng ieithoedd priod y gwledydd hynny.

I symud yr anhawster o ledaenu gweithiau llenyddol nodweddiadol Gymreig—cyfieithiadau o'r clasuron dyweder—gellid gyda rhwyddineb mawr ddefnyddio'r Esperanto fel cyfrwng.

Wrth ddysgu Esperanto ceir fod ei gramadeg wedi ei grynhoi i derfynau bychain iawn ac fod ei berfau yn rheolaidd a manwl ac ynddi drefniant cywrain i ffurfio geiriau. Gwna hyn yr iaith yn hawdd i'w dysgu.

Y mae llawer iawn o nodweddiad ynddi yn debig iawn i'r Gymraeg, ac y mae'n werth galw sylw at rai ohonynt. Y mae hi'n berffaith seinyddol ac nid oes yr un llythyren fud ynddi, ac y mae'r acen bob amser ar y sill olaf ond un.

Cymer ansoddeiriau y rhif liosog fel yn y Gymraeg, megys, *dynion duon* ; a diwedda berfau annherfynol

Kimrujo kaj Esperanto.

Estas apartaj motivoj kial la kimra nacio devas doni bonvenan kaj koran akcepton al la internacia helpolingvo Esperanto — motivoj, kiuj estas egale allogaj al la temperamento de la kelto kaj al la pli praktika vidopunkto de la lingvisto.

Bedaŭrinde, la popoloj de fremdaj nacioj malmulton scias pri la vivo kaj lingvo de la kimra nacio, kaj, verdire, malmulte el ili konscias, ke alia lingvo, krom la angla, estas parolata en Britujo.

Kimrujo posedas multajn eminentulojn, kiuj troviĝas en ĉiu sfero de la publika vivo—literaturistoj, ŝtatistoj, sciencistoj, artistoj, k.c., Ĉu ĝiaj poetoj kaj kantistoj ne elokvente atestis pri la mezuro kaj kvalito de la nacia spirito? La "eisteddfod"¹ ankaŭ daŭrigas esti perilo konservi la tradiciojn kaj la rajtojn de la nacio.

Malgraŭ tio, al la ekstera mondo ankoraŭ ne estas malkaŝita la vera genio kaj animo de la nacio, ĉar, super ĉio, ĝiaj literaturaĵoj ne estas konataj en aliaj landoj pere de la nacia lingvo de tiuj landoj.

Por forigi la malfacilecon disvastigi la notindajn literaturaĵojn kimrajn—ekzemple, tradukaĵojn de la klasikoj—oni povas kun granda facileco uzi Esperanton kiel perilon.

Lernante Esperanton oni ekscias, ke la gramatiko estas malvastigita ĝis plej malgrandaj limoj, ke ĝiaj verboj estas laŭregulaj kaj precizaj, kaj ke en ĝi troviĝas lerta sistemo de vortfarado. Ĉi tio faciligas la lernadon de la lingvo.

Estas multe da karakteraĵoj en ĝi, kiuj tre similas al la kimra lingvo, kaj kelkaj el ili estas atentindaj. Ĝi estas tute fonetika, kaj ne troviĝas en ĝi eĉ unu neelparolota litero, kaj la akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

La adjektivoj prenas la multenombbron kiel en kimra lingvo, kiel, *nigraj homoj* ; kaj la infinitivo

¹ Konkursifesto, simila al la Floraj Ludoj.

ag "i" fel mewn lliaws mawr o ferfau Cymraeg, megys, *holli*, *llosgi*, *oeri*, *poethi*, etc.

Y mae'r llafariaid hefyd bron i gyd yr un sain a'r rhai Cymraeg, ac y mae'n hawdd i'r Cymro gynhanu a deall geiriau fel, "ponto," "fenestro," "naŭ" (ŭ=w).

Dylai hyn fod yn gymhelliad cryf i'r Cymry ddysgu iaith sydd mor hawdd ac ar yr un pryd mor ddefnyddiol.

G. GRIFFITHS.

finiĝas per "i" kiel ĉe tre multe da kimraj verboj, kiel, *haki*, *bruli*, *malvarmigi*, *varmigi*, k.c.

La vokaloj ankaŭ havas preskaŭ la saman sonon kiel la kimrajn, kaj estas facile por la kimro elparoli kaj kompreni vortojn kiel *ponto*, *fenestro*, *naŭ*.

Ĉi tio devas esti forta instigilo al la kimroj ellerni tiel facilan kaj samtempe tiel utilan lingvon.

G. RHYS GRIFFITHS.

Catwg la Saĝulo.

(CATWG DDOETH).

Unu el la plej rimarkindaj homoj en la kimra historio, kaj homo, kiu profunde influis siajn samtempulojn, estis Catwg¹ la saĝulo.

Li naskiĝis en la sesa jarcento, plej aĝa filo de Gwynllwg, unu el la reĝoj en malnova Morgannwg² (Glamorgan).

Je tiu epoko la kimroj ĝuis pacan periodon (post jarcentoj da interbatalado kaj subpremado), sed la religia herezo evidentiĝis en la insulo, kaj Catwg, influita de la tiamaj cirkonstancoj, decidis fariĝi klerulo kaj piulo.

Lia klereco kaj pieco altiris al li grandan respekton kaj influon, kaj S-a Garmon faris al li inviton fariĝi abato de Llanfeithin, kaj al la tiea monaĥejo li transloĝiĝis.

Li vivadis tie ĝis morto je la tre maturiĝinta aĝo de cent dudek jaroj, kaj sub lia persona gvidado la plej kleraj homoj de tiu epoko instruiĝis.

Frapite de tia forta kaj impresa personeco, kiajn posedis Catwg, la episkopo de Llandaff³ ĉiam petis lian konsilon kaj subtenon en ĉiuj siaj entreprenoj; kaj, oni diras, ke, pro lia saĝeco, la reĝo Arturo⁴ elektis lin, kiel unu el siaj dudek kvar kavaliroj, kaj kiel unu el siaj tri ĉefaj konsilantoj.

Pro lia saĝeco, liaj konsiloj, parol-

¹ Elp. Katug.

² Graŝlando de Sudkimrujo.

³ Sidejo de la eparĥio de Glamorgan.

⁴ Laŭ la legendoj de Arturo kaj la Kavaliroj de la ronda tablo.

adoj, proverboj, kaj saĝaj diroj, li famiĝis tra la tuta lando; kaj tia estis la impresoj farita sur la tiamuloj, ke oni alkalkulis al lia kredito ĉiun diron kaj proverbon en kimra lingvo!

Tiel estis honorata Catwg la saĝulo, sanktulo, poeto.

* * *

La Opinio de Anglo pri Kimra Lingvo.

En la Oktobra numero de "Modern Language Teaching," unu el la malmultaj angloj, kiuj serioze studadas la kimran lingvon (S-ro A. S. D. Smith) verkis artikolon, en kiu li diras, interalie:—

"Se oni min demandus, kiu, el la diversaj lingvoj, kiujn mi elstudis, posedas la plej grandajn eblecojn por la poezio, mi senhezite dirus "la kimra." . . . La kelta (precipe la kimra), gramatiko enhavas elementojn tiel malsimilajn al tiuj, kiujn renkontas la studento de aliaj lingvoj, ke lia atento estas kaptata tuj de la komenco. Krom tio, la vortaro, plejparte,—krom ĉe sperta filologo—tute ne similas tion de iuajn konata lingvo. . . . Kiel la angla lingvo estas la perilo de la komerco, tiel la kimra estas la lingvo de la hejmo, de la religio kaj de la literaturo. Estas per ĉi tiu lingvo—la heredaĵo de multaj jarcentoj—ke la animo de emociema kaj poeziema popolo trovas esprimilon, sen kiu nacio estus malviva."

La Ĉapelo de Joĉjo Jones.

(HET JAC JONES).¹

Mi oftfoje aŭdis, ke la menso havas intiman rilaton kun la saneco aŭ malsaneco de la korpo, kaj tio estas tute vera. Jen rakonto por ci, kiu estas tiel vera, kiel la preĝo.

Post kiam mi junuliĝis, mi jam tre enuiĝis, laborante ĉe farmbieno, —tia vivmaniero estis tro malvigla por mi. Mi eksciis, ke junuloj estas bone pagataj ĉe la kotonfabrikejo en Yr Wyddgrug,² kaj tien mi rapidis por peti laboron.

Oni tuj min dungis kiel iaspecan helpanton al la ŝpinistoj, kaj tre plaĉis al mi la ofico. Estis tie junulo samaĝa kiel mi ĉe simila ofico—knabo unuokula, sed kiu povosciis pli bone vidi per sia sola okulo, ol aliaj knaboj per du. Li nomiĝis Vilhelmo James, kaj knabo treege petolema li estis, kaj li kaj mi baldaŭ fariĝis bonaj amikoj.

Ni tage partoprenis en friponaĵoj kontraŭ la ŝpinistoj, sed estis konsentite inter Vilĉjo kaj mi, ke ni reciproke nin kulpigos. Se oni igis min kulpa pri la friponaĵo, Vilĉjo James konfesis la kulpon, kaj mi simile agis kiam oni kulpigis lin. Tiamaniere ni sukcesis eviti la punon; kaj la ŝpinistoj tre sciis puni!

La ŝpinmajstro estis Tomaso Burgess, unu el la plej kruelaj kaj nepopularaj homoj ĉe la laboristoj; sed li estis tre ŝercema kaj ofte faris petolaĵojn kontraŭ la homoj sub sia kontrolado. Pro tio Vilĉjo James kaj mi ne estis malalte estimataj de li.

Mi iam legis, ke estas eble kredigi al homo sana, ke li malsanas, kaj al homo malsana, ke li fartas bone. Iun tagmanĝhoron mi tion konfidis al Tomaso Burgess, kaj diris li,—

¹ El "Ĉekamena rakontaro," verkita de Daniel Owen, aŭtoro de multaj ŝercoplenaj rakontoj en kimra lingvo. Pro la ofteco de idiotismoj oni tute ne povas fari al li la justecon, tradukante liajn verkojn.

² Mold.

"Estas tute facile provi tion se vi kaj Vilĉjo James kune pripensados kiamaniere fari eksperimenton kontraŭ unu el niaj kunuloj. Se Vilĉjo ne povas eltrovi tiucelan rimedon, nek vi nek mi trafos celon, ĉar efektive Vilĉjo estas diableto." Vilĉjo same opiniis pri Burgess.

"Ĉu vi scias tion, kio plej plaĉus al mi," flustris Vilĉjo iun tagon. "Mi ŝatus morti sammomente kiel maljuna Burgess!"

"Pro kio, do?" mi intermetis.

"Pro tio, ke li estas responda pri tiom da kulpoj, kaj dum oni priatentos lin, mi povos kaŝe eniri en ĉielon nerimarkite!"

Tamen, mi parolis kun Vilĉjo pri la sugesto de Tomaso Burgess, kaj antaŭ ol vesperiĝis la plano estis elpensita.

Unu el la ŝpinistoj, nomita Joĉjo Jones, portadis cilindroforman ĉapelon, kiun li kutimis pendigi sur hokon ekster la ŝpinejo.

Nu, do, la plano de Vilĉjo estis ĉirkaŭligi maldikan nigran ŝnureton ĉirkaŭ la malsupraĵon de la ĉapelo, ĉe la randon, kaj ĝin mallarĝigi kvaronon da colo, (kaj kvarono da colo, ci scias, egalas du mezursignojn rilate al ĉapeloj) kaj poste kredigi al Joĉjo Jones, ke lia kapo ŝveliĝis. La plano faris al maljuna Burgess grandan plezuron.

La venontan matenon, tuj kiam Joĉjo Jones komencis labori, Vilĉjo tre lerte ligis la ŝnureton ĉirkaŭ la ĉapelon, kaj, laŭ la plano, mi eniris la ŝpinejon, kaj diris al Joĉjo,—

"Johano Jones, ĉu vi ne fartas bone, hodiaŭ?"

"Certe, mia knabo, kial vi demandas?"

"Ho, pro nenio," mi respondis, "sed mi ekpensis, ke viaj tempioj aspektas iomete ŝvelitaj."

"Ho ne, mi vin certigas, ke mi

bonege sanas, dankon pro tio," eldiris Joĉjo.

Je la sepa, Vilĉjo lin alparolis, dirante,—

"Johano Jones, vi havas nekutiman mienon hodiaŭ matene; ĉu via kapo ŝveligis?"

"Ĉielo! ne; sed Edĉjo faris similan demandon antaŭ ne longe; kio igis vin supoziti tion?"

"Mi ne scias," respondis Vilĉjo, "sed io ĉe via kapo havas strangan aspekton, kvazaŭ unu flanko estis frapita. Permesu al mi vidi la alian flankon. Ne, la du flankoj similas unu la duan; verŝajne estis mi kiu imagis la kontraŭon," kaj, dirinte tion, Vilĉjo rekomencis sian laboron.

Kvin minutojn antaŭ la matenmanĝoro, maljuna Burgess aliris al li, kaj diris,—

"Bona ĉielo, Joĉjo, ĉu vi partoprenis bataleton hieraŭ vespere? Aŭ vi vin denove fordrinkis (ĉar via kapo similas rondan napon); aŭ vi trafis la "kapsveligon," kio nuntempe suferigas tiom da personoj.

"Mi ne gustumis eĉ unu guteton de post unu semajno, kaj mia kapo estas tiel bona kiel la kapo de kiu ajn el vi," akre respondis Joĉjo.

"Mi esperas, ke vi la veron diras," aldonis Burgess, lin adiaŭante.

Kiam Joĉjo ekiris al sia matenmanĝo, kaj provis surmeti sian ĉapelon, li neniel sukcesis. Li dubis ĉu li havas en mano la ĉapelon de iu alia, sed li rememoris, ke neniu krom li portas cilindroforman ĉapelon. Krome, lia nomo, per propra mano skribita, troviĝas interne de ĝi.

Li, do, prunteprenis ĉapeton kaj celis sian matenmanĝon, portante en mano la ĉapelon. Joĉjo Jones ne rekomencis sian laboron post la matenmanĝo.

Meztage, Burgess al li faris viziton, kaj trovis lin en lito suferanta fortajn dolorojn en la kapo. Lin vidinte, Burgess diris al Joĉjo, ke li sendube suferas pro la febro, sed, dank' al kuracilo nove elpensita, oni

povos lin tuj kuraci. Kaj li promesis aĉeti la kuracilon tiun posttagmezon mem.

Tiun vesperon Burgess kaj mi iris al Joĉjo, kaj ni alportis en botelo iom da olivoleo. Dum Burgess kaj la edzino de Joĉjo estis en la dormoĉambro, surverŝanta la oleon sur lian kapon, mi min okupis en la salono, maligante la ŝnureton de sur la ĉapelo; kaj, por elmontri la efikecon de la kuracilo, Burgess petis Sinjorinon Jones alporti la ĉapelon, kaj Joĉjo povis tre facile ĝin porti surkape.

Efektive, la oleo estis tiel multe elverŝita sur lian kapon, ke la ĉapelo tro facile glitis, kaj, sole pro la grandaj oreloj, kiujn posedas Joĉjo, ĝi estis malhepita tute kovri lian vizaĝon.

La doloroj, tamen, ne tuj ĉesis, kvankam la ŝveligo jam malaperis, kaj Joĉjo Jones restadis ĉe si dum unu tuta semajno antaŭ ol rekomenci sian laboron. Li ne eksciis pri la petolaĵo ĝis post tri semajnoj, kaj li neniam nin pardonis.

* * *

Kimraj Proverboj.

Saĝa la homo dum li silentas.

Kiu amas min, tiu ankaŭ amu mian hundon.

Kiam mortas serpento,
Mortas ankaŭ ĝia pikilo.

Kiu semas dornojn,
Tiu ne marŝu nudpiede.

Facile estas eltiri mallongan glavon el ingo.

La laboron de la nokto, la tago malkaŝas.

Faru la bonon sen diferenco al kiu ajn.

Bone estas dento por deteni la langon.

Pli bone la prudento, ol riĉaĵoj.

La redaktisto dankas al S-ro G. RHYS GRIFFITHS, pro lia afabla helpo en la preparado de ĉi tiu numero.

Eltiraĵoj el la Paroladoj de S-ro Lloyd George.

PRI KIMRUJO KAJ MALGRANDAJ NACIOJ.

“Granda estas la ŝuldo de la mondo al malgrandaj nacioj. La plej alta arto en la mondo estas la verko de malgrandaj nacioj. La plej nevelkema literaturo de la mondo estas la produktado de malgrandaj nacioj. . . .

Malgrandaj nacioj elektigis de Dio esti la ujoj porti lian plej dolĉan vinon al la lipoj de la homaro, feliĉigi ĝian koron, altigi ĝian percepton, instigi kaj fortigi ĝian fidon. . . .”

“La nacieco de la kimroj daŭre vivas post dumil jaroj, malgraŭ ĉiu homa penado ĝin pereigi. La plej fortaj regantaj potencoj en la mondo siavice celis ĝin subpremi, ĝin flatlogi, kaj eĉ per preĝoj ĝin malestigi; la romanoj, la saksoj, la danoj, la normandoj, kaj fine, la raso,

kiu estas intermiksiĝo de ĉiuj el ili, intermite bataladis kontraŭ la nacieco de la kimroj dum dudek jarcentoj, kaj malgraŭ tio . . . ĝi ne elmontras ian signon de ruiniĝo nek de kadukeco, kaj mi daŭre kredos, ke ĝia energio estas nutrita por servi iun profitdonan celon en la ekzaltiĝo de la nacio, kiu estas inspirata de ĝia influo.”

“Mi konas valon en nordkimrujo, inter la montoj kaj la maro, valo

bela, varma, komforta, kaj la montoj ĝin ŝirmantaj kontraŭ ĉiu severega blovo.


“Sed ĝi estis senenergiiga loko; kaj mi rememoras, kiel la knaboj grimpadis la montetojn supre de

la vilaĝo por trafi ekvidon de la grandaj montoj for en la malproksimeco, kaj esti instigitaj kaj refreŝigitaj per la blovoj, kiuj venis de la supro de la montetoj, kaj per la vido de tiu granda valo.

“Ni vivadis en ŝirmita valo dum generacioj. Ni estis tro komfortaj, tro indulgemaj, kaj eble tro egoistaj. Kaj jam nun la severa mano de la sorto nin skurĝis ĝis alteco tia, kia permesas al ni vidi la grandajn eternajn aferojn, kiuj estas gravaj por nacio, la grandajn pintojn de l' honoro,

kiujn ni jam forgesis, la devon kaj la patriotismon, kaj, vestita per rebriliga blanko, la grandan pinton de l' memofero, kiu sin almontras al ĉielo kiel severa fingro.

“Ni denove malsupreniros al la valoj, sed dum filoj kaj filinoj de la nuna generacio vivados, ili tenos en koro bildon de ĉi tiuj montopintoj, kies fundamentoj neniel moviĝos eĉ se Eŭropo ŝanceliĝos kaj balanciĝos en la konvulsioj de granda milito.”



S-ro DAVID LLOYD GEORGE,
Ĉef-ministro de Granda Britujo.

Kantoj kaj Poemoj el Kimra Lingvo.

Lando de l' Patroj.

(HEN WLAD FY NHADAU).

*Ho, lando de l' patroj tre kara al mi
La lando de bardoj kaj dolĉ-melodi'.
Por vi patrujanoj kun amo en kor'
Elverŝis vivsangon en glor'.*

(Rekanto dufoje).

*Kimro-land' kara vi estas al mi
Kun ondoj de l' mar' ĉirkaŭe de vi
Vivadu la lingvo kun ni.*

*Kimrujo montlando de l' bard' paradiz'
El ĉio elbrilas plenama deviz' ;
Al kimro fidela, aŭdiĝas kantet'
En ĉiu rivera ondet'.*

*Kaj malgraŭ invad' kaj premega
sufer'
La lingvo de l' patroj vivadas sur
ter' ;*

*Neniam ekhaltis poeta la ton'
De l' bardoj, nek harpa la son'.*

Tr. de J. D. APPLEBAUM.

* * *

Tra l' Tuta Nokt'.

(AR HYD Y NOS).

*Kimro amas sian lingvon
Tra l' tuta nokt'.
Volas esti en Kimrujo
Tra l' tuta nokt'.
Amas ĉiam siajn fratojn,
Siajn leĝojn, siajn morojn,
Siajn bravajn, fortajn avojn,
Tra l' tuta nokt'.*

Iru ni al hejm' kantante

Tra l' tuta nokt' ;

Nia lingvo estas ĉie

Tra l' tuta nokt'.

Regu amo kaj frateco

Unueco kaj braveco

Do ni vivu en dolĉeco

Tra l' tuta nokt'.

Tr. de G. MEIRION GRIFFITH.

Ĉiam Restu, Ho! Somer'.

(O NA BYDDAI'N HAF O HYD).

Ĉiam restu, ho! somer'

Bluĉielo super ter' ;

Sunradioj briladantaj ;

Birdoj de l' arbar' kantantaj ;

Mil da floroj ridetantaj ;

Ĉiam restu, ho! somer'.

Ĉiam restu, ho! somer'

Iru vintro for de l' ter'.

Ke neniam malbonhoro :

Nek malĝojo nek doloro :

Regu en la homa koro :

Ĉiam restu, ho! somer'.

Ĉiam restu, ho! somer'

Tag' senfina sur la ter'.

Mondo plena de beleco :

Kaj naturo de gajeco :

Kun ni restu la juneco :

Ĉiam restu, ho! somer'.

Tr. de JACK EDWARDS.

* * *

Revenu Vi Hejmen.

(O TYRED YN OL.)

Dolora la koro, sen bril' la okul'

Ho, kie vi restas, amata karul' ?

La knaboj atendas dum ĉiu moment' :

Forestas vi longe sen nia konsent'.

Revenu vi hejmen, hejmen al ni

La hejmo ne estas plu hejmo sen vi!

Vi ĉiam ja estas karulo por mi ;

Pro vi nur sopiras la koro en mi ;

Ho, venu hometon al bela valet'

Ni tuj kontentigos en kara hejmet'.

Revenu vi hejmen, hejmen al ni

La hejmo ne estas plu hejmo sen vi !

Kruela batalo ekvokis vin for ;

Kaj ofte bategas pro tim' mia kor'.

Batalo nun ĉesu ! Al via edzin'

Revenu karul', trankviligu nun min.

Ho, venu la pac' : ne estu vi sklav' ;

Nun ĉesu batalo, rompiĝu la glav' !

Tr. de G. MEIRION GRIFFITH.

La Plendo de l' Vento.

(CWIN Y GWYNT).

*Ci-nokto al miaj okuloj ne sendas
La dormon, nur larmoj min premas.
Ĉar apud fenestro la mia jen plendas
La vento kaj ĝemas.*

*Gi levas nun sian la voĉon en ploro
Maldolĉa kaj plenda kompato.
Kaj sendas sur vitron per kri' de
doloro
La larmojn kun bato.*

*Ho, kial al mia fenestro vi venas
Ploranta maldolĉe nun vento?
Ĉu perdo de iu amato vin tenas
En daŭra lamento?*

Tr. de J. D. APPLEBAUM.

* * *

[Originalaĵo.]

La Matena Roso.

*Matena roso lukse vestas la ĝardenon
Per kiso de opaloj,
Majeste pentras grandiozan la
marginon
Per gloro de l' petaloj.*

*Mil sunoj fajre sternas sin en floraj
koroj,
Mil mondoj, etaj, ĉarmaj,
Aŭ eble larĉoj falis kvazaŭ meteoroj—
Ankoraŭ brule varmaj.*

*Eĉ larmoj pelas for angoron, ĝin
dolĉigas,
Briletas kiel roso,
Donaco de l' ĉielo, kiu nin alligas
Per vervo de l' patoso.*

BERTRAM POTTS.

(New Zealand).

* * *

— Ne, diris la maljunulo, severe,
mi ne faros tion. Mi neniam vendis
ion sub falsaj priskriboj, kaj mi ne
komencos nun. Tiu ŝuo estas de
malsupera grado, kaj mi ne ŝajnigos,
ke ĝi estas de pli bona kvalito.
Marku ĝin 'Ŝuo taŭga por reĝino'
kaj metu ĝin en la fenestro. Reĝino
ne estas devigata multe piediri.

Veraĵoj de Catwg la Saĝulo

EL

"LA TRIAĴOJ." ¹

Sen amo sen senco,
Sen senco sen komprenemo,
Sen komprenemo sen konsider-
emo,
Sen konsideremo sen scio,
Sen scio sen prudento,
Sen prudento sen edukeco,
Sen edukeco sen favoro,
Sen favoro sen Dio,
Sen Dio sen io.

* * *

KONSILO.

Se vi saĝa volas esti, diru mal-
multe,
Respektoplene, malrapide kaj
prudente.

Ne al konsilejo iru, ne invitite,
Kaj neniun vorton diru, ne
aŭskultinte.

Kaj kiam vi parolos, estu serioza,
Tenu vin plej inde, ne estu furioza.
Elektu ĉiun diron kun plena
taŭgeco,
Pro la paco, amo, kaj komuna
justeco.

Nenion celu krom la sciadon dis-
semi,
La leĝojn observi, la regadon
subteni;

Kaj penadu akiri je ĉiuj okazoj,
Unue, plaĉon ĉe Di', kaj plaĉon
ĉe homoj;

Konsideregon montru al konsilo
mia,
Kaj inter saĝuloj vi fariĝos ja tia.

* * *

La justulo faras sian devon
malgraŭ minacoj.

* * *

Tri fundamentoj de l' saĝeco:
konsidereco, sciado kaj penado.

* * *

Se vi ne estas forta estu ruza.

¹ El kolekto de la verkoj de Catwg,
redaktita ĉirkaŭ la jaro 1400.

Komercaj Leteroj.

Señor Manuel Fernandez,
Tampico, Mexico.

Dear Sir,—Replying to your favour with reference to the Lowry compress, we would state that we have been running the Lowry compress here at our gin for the last two seasons. The press has given us and our customers who used it perfect satisfaction, both in its mechanical working and by reason of the ready sale of the Lowry cotton right at the gin at a premium of from $\frac{1}{4}$ to $\frac{1}{2}$ cent. net over the square bale.

The exact weight of the bale being stencilled on the covering, the farmers thus obtain the full weight of the actual cotton as it leaves the gin, and thus save the usual "loss in weight" in the hands of factors and commission merchants. They also benefit by the compactness of the bale and the ease with which it can be handled and stored.

In closing we would say that we shall be glad to answer any question that prospective lessees may want to ask.—Yours truly,

DAWSON & PERRY.

Señor Jimenez P. Ayza,
Villa Clara, Cuba.

Dear Sir,—We have your favour of the 22nd, advising us that the cylinder on your "Little Giant" is cracked, and beg to say that we do not understand this. All of these engines are tested at the factory before being shipped out, and are in perfect condition. The only solution we have for the trouble is that you failed to watch the gauge. If such is the case we shall, of course, expect to charge you for repairs.

We enclose herewith price-list and description of parts; and if you will describe the trouble more in detail, the matter will have our attention. Yours truly,—

RYDER MACHINE CO.

S-ro Manuel Fernandez,
Tampico, Meksiko.

Estimata Sinjoro,—Respondante vian ŝatatan leteron pri la premilo *Lowry*, ni deziras diri, ke ni uzas la premilon *Lowry* ĉe nia fabrikejo jam du sezonojn. La premilo nin kaj niajn uzintajn ĝin klientojn perfekte kontentigis, tiel per sia mekanika funkciado kiel pro la debito de la *Lowrie*-kotono tuj ĉe la fabriko, po neta pliprezo de $\frac{1}{4}$ ĝis $\frac{1}{2}$ de cendo super la kvadrata pakego.

Tial ke la preciza pezo de la pakego estas stencilita sur la kovraĵo, la farmistoj ricevas la plenan pezon da kotono tiom, kiom eliras el la fabrikejo, kaj oni tiamaniere evitas la kutiman "perdon je pezo" en la manoj de faktoroj kaj makleristoj. Oni profitas ankaŭ per la kompakteco de la pakego kaj la facileco, kun kiu oni povas movadi kaj kunarigi ĝin.

Finante ni volas diri, ke ni volonte respondos kian ajn demandon laŭ deziro de luemuloj.—Kun respekto,

DAWSON KAJ PERRY.

S-ro Jimenez Ayza,
Villa Clara, Kubo.

Estimata Sinjoro,—Ni havas vian ŝatatan leteron de la 22a, sciigantan nin pri fendetiĝo de via "Little Giant," kaj permesas al ni diri, ke ni tion ne komprenas. Ĉiuj ĉi maŝinoj estas elprovataj ĉe la fabrikejo antaŭ la ekspedo, kaj estas en perfekta stato. La sola de ni konjektebla klarigo pri la difekto estas tio, ke vi malatentis la premmontrilon. Se jes, ni kompreneble konsideros vin pagresponda por riparoj.

Ni ĉi-kune sendas prezaron kaj priskribon pri maŝineroj; kaj se vi informos nin pli detale pri la difekto, ni okupos nin pri la afero.—Kun respekto,

RYDER-MAŜINKOMPANIO.

To the Green Star Shipping Co.,
London.

Gentlemen,—Kindly inform us by return of post what the rate of freight would be by your line of steamers from London to New York, on wooden cases containing soap, and state at the same time whether the calculation is for weight or measurement.

Also favour us, please, with a specimen Bill of Lading, which will show the conditions of shipment.—Yours faithfully,

ESPERO SOAP COMPANY.

To Mr N. Sefton, Shipchandler.

I confirm my telegram by which you were informed of the arrival of your ship "Espero" in this port.

From the report of the shipmaster the voyage was very arduous.

During the first 8 days a strong north wind blew and very big waves tossed the ship and often covered the deck. The shaking suffered by the ship has evidently caused some displacement of the cargo, and consequent breakage of several wine barrels and loss of a large quantity of wine.

I immediately notified the agent of the insurance company, so that he might visit the ship and discover the ultimate damage suffered by the cargo through the bad weather.

The shipmaster does not think that the storm has damaged the ship, except that the main sail is somewhat torn and two ropes have been broken.

Two of the crew are ill and went into the hospital here immediately after the arrival of the ship in port. Their illness, however, does not seem to be dangerous, and has been caused by over-exhaustion, as on account of the protracted storm they had to work day and night almost without any rest.

Awaiting your orders,—Yours respectfully,

R. THOMAS, *Ship Agent.*

Al la Verda Stelo Ŝipkompanio,
Londono.

Sinjoroj,—Bonvole sciigu al ni revenpoŝte, kiom kostos la transportado per viaj ŝipoj de Londono al Novjorko, de lignaj skatoloj, kiuj enhavos sapon, kaj diru samtempe ĉu la kalkulo estos laŭpeza aŭ laŭmezura.

Ankaŭ favoru nin, ni petas, per specimena Ekspedatesto, kiu montros la transport-kondiĉojn.—Fidela via,

ESPERO SAP-KOMPANIO.

Al S-ro N. Sefton, Ŝipekipisto.

Mi konfirmas mian telegramon, per kiu vi sciigis pri la alveno de via ŝipo "Espero" en tiun ĉi havenon.

Laŭ la raporto de la ŝipestro, la vojaĝo estis tre peniga.

Dum la 8 unuaj tagoj blovis forta norda vento kaj tre grandaj ondoj balancis la ŝipon kaj ofte kovris la ferdekon. La skuado suferita de la ŝipo kredeble kaŭzis malstivon de la ŝarĝo kaj sekve rompon de kelkaj vinbareloj kaj perdon de granda kvanto da vino.

Mi tuj avertis la agenton de la asekura kompanio, por ke li vizitu la ŝipon kaj konstatu la eventualan difekton suferitan de la ŝarĝo pro la malbona vetero.

La ŝipestro ne pensas, ke la ventego difektis la ŝipon, krom la granda velo iom ŝirita de la vento kaj du ŝnuregoj rompitaĵ.

Du el la ŝipanoj malsaniĝis kaj eniris la ĉi tian hospitalon tuj post la alveno de la ŝipo al la haveno; ilia malsano tamen ne ŝajnas esti danĝera kaj estas kaŭzita de troa lacigo, ĉar pro la longedaŭra ventego, ili devis labori tage kaj nokte, preskaŭ sen ia ripozo.

Atendante viajn ordonojn, mi salutas vin respektplene,

R. THOMAS, *Ŝipagento.*

Ekzercoj de Aplikado de la Oficiala Radikaro.

de H. M. SCOTT.

BEN-

Mi *benos* vin...kaj vi estas *beno*.

Gen. xii. 2.

Mia vivo estis plena de *bena paco*.

U.L. 95.

Benita (estas) la sabato. *P.A.* 30.

Benata la frukto de via ventro.

Lu. i. 42.

Kristo, la Filo de la *Benato*. *Mk.*

xiv. 61.

Adiaŭ, nobla manĝoĉambro, mi ne

diros plu la *benpreĝon*! *L.R.* vi.

347.

Voku la konfesprenanton, ke li *for-*

benu al mi miajn pekojn. *Rab.* 132.

Tiu ĉi *malbenis* ĝin en la nomo de

Allah. *F.K.* 33.

Al la diablo! *malbenis* li pole.

F.O. 3.

Li murmuretis hebreajn *malbenojn*.

P.A. 145.

Ĝi estas *malbena* tero! *Ibid.*

Ŝi salte leviĝis kun *malbena* krio.

Las. 16.

BENK-

Mi eksidos sur ĉi tiu herbaja *benko*.

In. Ka. 56.

Mi tenas la piedojn sur *benketo*.

Ekz. 26.

Jen alvenas la kaleŝo de la regi-

mentestro kun lia lakeo sur la

antaŭbenko. *Km.* 29.

BIER-

Oni donas al li . . . kruĉon da

biero.—*F.K.* 70.

Juna edzino de *bierfaristo*.—*Mar.*

iv. 65.

BIFSTEK—

Vi prenos kotleton aŭ *bifstekon*?—

Kon. 20.

BIGOT-

(La urbo) estas tiel abomene *bigota*.

—*Rab.* 60.

La paŝo estas tiel facila . . . kiel la

salto de publikulino al *bigotulino*.

—*Rab.* 57.

BILANC-

La kvaronjaraj *bilancoj* . . . estas

submetataj al la komitatanoj.—

Jar. 6, 61.

(Dist. *saldo*.—*Ib.* 6, 62.)

La *bilanco* por la racio estis kiel kvar

al unu.—*V.C.* 53.

Li estas preta pagi, por *bilanci*

la eblan deficiton.—*Bou.*—*L.R.V.*

189.

(Kp. *saldi*—*Kon.* 77 (pli korekte).)

BILD-

Ni kreu homon laŭ nia *bildo*.—*Gen.*

i. 26.

Ne faru al vi idolon nek *bildon* de tio,

kio estas en la ĉielo, k.t.p.—

El. xx. 4.

Detruu . . . ĉiujn iliajn fanditajn

bildojn.—*Nom.* xxxiii. 52.

Mi povu prezenti al vi ĝustan *bildon*

pri la tuta historio.—*Zam.*—*L.R.*

viii. 4.

Vidu la *bildojn* sur la apuda paĝo.—

I.B. i. 248.

Mi diktas al unu skribajisto . . . la

vivan *bildon* de unu tiea doktoro.

—*Rab.* 53. (Kp. plena portreto—

Ekz. § 11.)

Ili havis antaŭ si *vivantan bildon*, en

kiu partoprenis ĉirkaŭ cent figur-

antoj.—*Far.* ii. 23.

(Eble vi) krajone *bildas* ĝian turon?

—*Ĝin.* 13.

S-ro Parrish . . . paroladis pri

Kalifornio kun *lumbildoj*.—*P.*—

A.E., Aŭg. '13.

BIND-

La belan, per oro kaj veluro *binditan*

pergamenan libron.—*Baĥ.* viii.

245.

Librojn en simpla *bindo* aŭ sen *bindo*.

—*Mar.* iv. 11.

BIOLOGI-

“Facilaj lecionoj de *biologio* de la

bestoj.”—*F.K.* 203.

La problemo estas ne matematika

sed *biologia*.—*C.*—*Esp.* Jul. '13.

The following plan for learning the vocabulary has been tried by many self-taught Esperantists, and is strongly recommended by them. Take a double sheet of foolscap and fold it over in inch folds, which will give about twelve divisions altogether. Copy from the text-book the English words of which you wish to learn the Esperanto. Having thus filled the first column, close the book and endeavour at once, from memory, to insert the Esperanto equivalents into column two. This should prove no difficult task, but any blanks should be filled in from the key and *underlined* to denote that they were not remembered. This done, fold under column one, so as to leave only the Esperanto words of column two visible, and translate these into English on column three, so far as the memory will allow. The gaps can now be filled in from column one, which, however, should not be resorted to until the attempt has been made to work through the entire list. Then re-translate the English words in column three into Esperanto on column four, and so on to the end; and it may be guaranteed that by the time the twelve columns have all been filled in in the manner indicated, that particular set of words will have been most thoroughly mastered.

* * *

SinJORINO Novedzino je la fino de la kuirklaso gajnis la diplomon.

— Mi gajnis tian belan diplomon, ŝi diris al la edzo, dum ili vespermanĝis. — Ĝi estas skribita sur pergameno kaj portas grandan ruĝan sigelon. Kaj por festi la okazon mi kuiris la manĝaĵon, kiun vi nun manĝas. Ĝi estas mia propra ideo. Divenu, kio ĝi estas?

S-ro Novedzo silentis dum li daŭrigis la manĝon. Tiam post iom da pripensado kaj hezito li balbutis:

— Ĉu . . . ĉu . . . ĉu . . . ĝi estas la diplomo?

ONI INSPEKTAS LA ĈEVALON.

Maljunulo (iom surda, kiu inspektas vendeblan ĉevalon): — Ĉu mi aŭdis vin diri, ke antaŭ tri jaroj vi pagis por ĝi kvindek funtojn, aŭ ke vi pagis por ĝi tri funtojn antaŭ kvindek jaroj? *Punch.*

* * *

La malgranda Greko: — Paĉjo, kion vi faris en la Trojana Milito?

Paĉjo (fiere): — Mia infano, mi pentris la makulojn sur la ligna ĉevalo. *Punch.*

* * *

Korespondantojn Deziras

S-ino. Tynne Boëlius, Pinnink, 30, Tampere (Finnlando).

S-ro E. Boëlius, komercisto, P.M.P.J., Tampere (Finnlando), per angla lingvo.

F-ino Aini Pajunen, Alppikatu, 27, Helsingfors (Finnlando), kun skoltoj.

F-ino Elli Liukkonen, Ecrikin-katu, 25, Helsingfors (Finnlando), kun skoltoj.

Leo Falava, Topelinskatu 9 B., Helsinki, Finnlando, por anoj de Esperanta kurso.

* * *

La ĉiusemajna Japano gazeto por infanoj "Ŝukokumin Ŝimbun" presigas Alvokon de Japanaj geknaboj, pere de Esperanto, por korespondantoj en ĉiuj landoj. Jen elĉerpaĵo el ĝi: "Karaj geknaboj en ĉiuj alilandoj, Japanujo, izola lando en Oriento, estas konata kiel la plej bela lando, kie edukado tiel trafe disvolviĝas, ke geknaboj diligente studas, kaj senescepte iradas al siaj lernejoj. Ili amas la pacon, kaj sekve entenas la varman deziron interrilatiĝi kun ĉiuj landoj.

Karuloj, bonvolu sendi al mi, ĉu desegnaĵojn, ĉu manlaboraĵojn, kiujn vi laboris, ĉu vidaĵpoŝtkartojn, ĉu viajn portretojn. Ankaŭ mi volonte akceptos verkaĵojn, al kiuj vi aldonu tradukaĵojn en Esperanto. . . ."

S-ro Akio Takao, ĉe Eldonejo, Ŝokokumin Ŝimbun-sha, 1-ĉome, Kyomaĉibori-dori, Niŝiku, Osaka, Japano.



Competition for Boys and Girls.

Conducted by Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95 Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those who obtain the highest total number of marks.

N.B.—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

FOURTH COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 5th May.

(a) Muzikiloj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de muzikiloj kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. La viro estis instigita rifuzi vian proponon per la minaco de superulo.

2. Kial li respondis tiel malĝentile al via invito?

3. Mi montros al vi la herban ĝardenon post la matenmanĝo.

4. Estas dezirinde, ke ĉiu, kiu povas, faru sian eblon helpi antaŭenpuŝi nian karan aferon.

5. Al tia absurda demando li ne intencas respondi.

(b) Floroj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de floroj kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. La instruisto parolis pli emfaze ol kutime pri la Esperanto movado.

2. Estas malsaĝe trinki tiom da limonado, kiam oni estas soifa.

3. Li estas tiel naiva, ke oni nomas lin la "oficeja novico."

4. Ĉu vi ne trovas, ke estas pli facile gladi ol kalandri?

5. Mi deziras, ke li anstataŭu min ĉe la kunveno.

Result of the Second Competition.

The highest number of marks in this competition has been gained by:

DORIS M'CLELLAND (age 13),
Green Lane C.C. School,
Patricroft.

*Honours List (11 marks):—*Nora Bradburn, Florence Barratt, Hilda Davenport, H. Else, John Emery, Alfred Grayson, Bertha Hewitt, Ella Holden, James Holland, Albert King, Hettie Lee, Dorothy Norris, Fred Monks, James Russell, Claude Watkins, —, *Green Lane C.C. School, Patricroft.*

*(10 marks):—*David Anderson, David Blair, Robert Brandie, Matthew Browning, Wm. Burchell, Kenneth Christie, Jas. Finlay, Meg Fleming, Geo. Francis, James Hare, Chrissie Hutton, Robert Jamieson, W. S. Kinghorn, Bella Leiper, Bessie M'Donald, Charles M'Intosh, Robert Murison, Alexander Reid, Walter Shand, Robert Stewart, Alex. Watson, Rich. Wimberley, *Donaldson's Hospital, Edinburgh*; —, *Halstead*; James Ramsay, Robert Thomson, John Williamson, *Bonnington Road School, Leith*; Albert Aldred, James Ashurst, W. Ashworth, Ernest Beardshaw, Sidney Brown, Harold Burns, Wm. Butterworth, L. Chapman, Edith Clarke, John Graythorne, Herbert Daniels, James Dawson, John Drinkle, Smith Dugmore, George Dupree, Marjorie Dyson, Frederick Evans, Hubert Fagan, John Fawcett, Norman Finlow, John Fleming, John Fletcher, James Floyd, G. Hadcroft, David Hall, Frank Harley, Arthur Harris, Harry Higginbotham, John Holland, A. Holt, Ernest Holt, Arch. Hooley, Ernest Humphries, T. Hunter, Clifford Johnson, Cyril Jones, John Jones, Thos. Jones, Thos. Kennedy, Dennis Kirwin, E. Lees, Wilfred Manley, Fred Miles, Godfrey Nelson, May Orcherton, Daisy Owen, Frank Pearson, G. Peters, John Rainger, Chas. Roberts, Frank Robinson, George Smith, Walter Smith, John Stanbrook, John Stone, Harry Suddaby, Ethel Taylor, John Thomason, Charles Trott, L. Walker, Mark Weston, Samuel Wilkins, Kenneth Wilson, Arthur Wood, *Patricroft*; H. P. Mulholland, *Bishop's School, Salisbury*; Muriel Severn, *St John's College, Worcester.*

*Hon Mention (9 marks):—*L. T. Darch, *Colston's School, Stapleton, Bristol*; Kath. Langley, *C.C. School, Buxton*; L. Peskett, *Branksome Heath School, Upper Parkstone, Dorset*; Constance Darbon, Kath. Osmond, *North London Collegiate School*; Dorothy Darbon, *Highbury Hill High School, London*; Harry Berry, Joseph Davenport, Arthur Dean, Fred. Duesbury, Edith Gardner, Fred Hesketh, William Kershaw, Gertrude Williams, *Patricroft.*

*Commended (8 marks and under):—*Samuel Bennett, Hugh Gray, Sidney Wilson, *Patricroft.*

* * *

THE ESPERANTO MONTHLY for 1918, bound, 4s. 6d., plus postage. Cases, 1s. 7d., plus postage.

Solutions.

(Second Competition, p. 20.)

(a) Bestoj :—(1) tapir, (2) alk, lam, (3) lup, (4) leon, (5) mul.

(b) Nomoj de Knaboj :—(1) Filip, (2) Donald, (3) Ludovik, (4) David, (5) Timote. * * *

£10 in Prize Competitions.

The entry date for these competitions, announced by the B.E.A.L. and D.S. in January, has been extended till 30th April. Readers wishing to compete should write for full details to Mr C. H. Edmonds, 254 Wightman Road, London, N.8.

SECURE THE ADVANCED CERTIFICATE!

Do not risk failure through lack of Preparation
Save time, money, reputation, effort

ALBERT CHAPMAN, F.B.E.A. (Hons.), has introduced a 12-Lesson Correspondence Course specially designed to prepare pupils for the B.E.A. Advanced Exam. A large number of students among all classes throughout the British Isles have already availed themselves of this opportunity, and fresh enrolments are constantly coming in.

The Course will

Discover and **Strengthen** your weak points.
Secure **Grammatical Accuracy**,
Cultivate your **Style**, and
Ensure Success at the Advanced Exam.

TOTAL FEE, including Cox's "Commentary," 12/6

Send Stamps for Prospectus to

ALBERT CHAPMAN, F.B.E.A.

"Kenilworth," Walton Highway, Wisbech

NUN PRETA

La unua kajero de la kvaronjara gazeto
de Esperanta Literaturo

"LITERATURO"

Abonprezo: 2s. 6p. jare

Unu numero: 9p. afrankite

Eksterlande: Sm. 1.5

Unu numero: 4 respondkuponoj

LA REDAKCIO: "LITERATURO"

254, WIGHTMAN ROAD, LONDON, N.8

DUTTON'S 24 HOUR

DUTTON'S Shorthand has only six rules and twenty-nine characters. Complete theory learned in twenty-four hours. That stage reached, practice quickly gives high reporting speeds. Send two stamps for specimen lesson to Dutton's College (Desk D. 62), Skegness.

SHORTHAND

Deka Brita Kongreso.

LIVERPOOL,

6a ĝis 10a de Junio 1919.

La Deka Brita Kongreso kaj la jara kunveno de la Brita Esperantista Asocio okazos en Liverpool ĉe la Pentekosta libertempo. La organizantoj esperas, ke multaj samideanoj kaptos ĉi tiun okazon por viziti la urbon, kaj, precipe, ke alilandaj samideanoj venos laŭeble. Loka komitato kun la akordo de la konsilantaro de B.E.A. energie klopodas por prepari interesan kongreson kaj zorgas pri la komforto de la vizitontoj.

La kongresaj biletoj estas nun pretaj kaj la angla esperantistaro estas petataj aĉeti ilin tuj de la Hon. Sek. (prezo 3s. 6d. ĝis la fino de Aprilo, poste 5s.). Al tiuj kiuj aĉetas la biletojn kaj ne povas veni, la komitato sendos ĉiujn kongresajn dokumentojn kaj enskribos ilin poste kiel "subtenantoj de la Deka" kies nomoj aperos en la Junia numero de la *British Esperantist*.

Nuntempaj aranĝoj pri Hoteloj estas laŭ sekvanta Tarifo: A. 8s. 6d., B. 7s. 6d., C. 6s. 6d., D. 5s., ĉia por lito kaj matenmanĝo. Partoprenontoj estas insiste petataj skribi tuj al la Sekretario, pri siaj intencoj kaj deziroj ĉar la hotelaj aranĝoj estas en la nunaj cirkonstancoj tre malfacilaj.

Hon. Sek.—J. D. Applebaum, 11 Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool.

* * *

LA DEKA

LIVERPOOL

JUNE 6-10

NEPRE ĈEESTU

THE ESPERANTO MONTHLY

Subscription—2/6 per annum, post free

SUBSCRIPTIONS and all BUSINESS COMMUNICATIONS should be addressed to *The British Esperanto Association*, 17 Hart Street, London, W.C.1

EDITORIAL MATTER should be sent to S-ro W. M. PAGE, 218 Bruntsfield Place, Edinburgh.

SELECT LIST OF ESPERANTO BOOKS

OBTAINABLE FROM
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated)
 17 HART STREET, LONDON, W.C.1

IMPORTANT INTIMATION AS TO BOOK PRICES.

In accordance with the instruction of the Annual General Meeting of the Association on 20th May 1918, the Executive has made the following decisions:—

Members' Discount to be abolished.

The prices of books published abroad to be adjusted to meet the present great increase in cost of importation.

Members' Orders value 10s. or over post free. In all other cases at least 10 per cent. (one-tenth) should be added for postage.

Secretaries of Affiliated Groups and the Trade to receive the usual discounts and to pay carriage.

The present 10 per cent. War increase on list prices to be abolished.

THE ESPERANTO MANUAL

By MARGARET L. JONES

Fifth Edition. 1s. 6d. net, 1s. 8d. post free

THE ESPERANTO TEACHER

By HELEN FRYER

Sixth Edition. 1s. net, 1s. 2d. post free

Second Edition **THE** *Revised*

'EDINBURGH' ESPERANTO POCKET DICTIONARY

206 pages. 18,000 words

"A really useful, convenient, and presentable volume."—*British Esperantist.*

Leather, 2s. 7d. post free; Cloth, 1s. 7d. post free

SHAKESPEARE IN ESPERANTO

HAMLET (Dr ZAMENHOF). Paper, 2s.

MAKBETO (LAMBERT). Cloth, 2s.

LA VENTEGO (MOTTEAU). Cloth,
2s. 2d.

LA VENECIA KOMERCISTO
(WACKRILL). Paper, 1s. 6d.

THE BIBLE IN ESPERANTO

NEW TESTAMENT, complete

(Published by British & Foreign Bible Society)

White Paper, Art Cloth, 2s.; French

Morocco, 2s. 6d.; Persian Yapp, 5s.

India Paper, French Morocco, 3s. 6d.;

Persian Yapp, 6s. 6d.; postage 3d. extra

OLD TESTAMENT

Dr ZAMENHOF's Translations

Genesis, Exodus, Leviticus, Numbers,
Deuteronomy, 2s. each; the Psalms,
2s. 6d.; Proverbs, 1s. 6d.; Ecclesiastes, 9d.

By BERNARD LONG, B.A.

ESPERANTO AND WHY WE NEED IT

30 pp. Price 2d.

Two Shillings a dozen post free

"A convincing booklet"

INDISPENSABLE BOOKS FOR ADVANCED STUDENTS

GRAMMAR AND COMMENTARY

Compiled by

Maj.-Gen. GEORGE COX, B.A. (Cantab)

Post free, 2s. 9d.

ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY

By EDWARD A. MILLIDGE

Post free, 5s. 3d.

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

By JOSEPH RHODES, F.J.I.

Post free, 5s. 5d.